
**KIU, KIO, KIA... -** infanpoemo

Kiu vi estas?
Joĉjo-ŝercanto.
Kio vi estas?
Bona lernanto.
Kia vi estas?
Nu...neplenaĝa.
Kion vi volas?
Esti kuraĝa.
Kiom vi aĝas?
Mi ne konfesas.
Kial? Klarigu!
Ĉar ne necesas.
Kie vi loĝas?
Ĉe la avino.
Kien vi iras?
Al mondofino.
Kiam ĝisiros?
Post la horeto.
Kiel? Piede?
Ne, per raketo.



La poemo aperis en “Fabela Mondo”. Ni publikigas ĝin kun la permeso de Esperantina Mirska, filino de la aŭtorino, kiu mem pretigis la ilustraĵojn.